# Dansk ★ ESPERANTO-BLAD

UDGIVET AF
ESPERANTIST-
FORENINGEN
FOR
DANMARK

★

ELDONATA DE
CENTRA DANA
ESPERANTISTA
LIGO

★

30. ÅRG.
MAJ 1958
NUMMER

5




*Joŝiko Kaĵino*
Sendube la plej bona propagando pri Esperanto en nia lando ĉijare.

**DANSK ESPERANTO-BLAD**
udkommer den 15. i hver måned.
Stof må være redaktøren i hænde senest den 25. i den foregående måned.
Redaktør: *Ole Nederland*,
Primulavej 61, III, Odense.
Ekspedition: *Arne Kolle*,
Landlystvej 48, Silkeborg.
Postkonto 57274.
Abonnement: 8 kr. pr. år.
Eksterlanda jarabono: 6 d. kr. aŭ 10 respondkuponoj.

## La EADI-kunveno

kun partopreno de geinstruistoj ĉiuflanke de organizaj limoj okazos *sabaton la 24-an de majo je la 19,30-a horo en Frederiksgård Skole, Frederiksgårds Allé 13, Frederiksberg* (10-minutan iradon de la jarkunvenejo). Trambuso de Jernbaneallé ĝis Frederiksgårds Allé (nr-o 21).

Precipe ni pritraktos la eblecojn por povi kolekti ĉiujn danajn esperantistajn instruistojn en nian asocion. Ni insiste admonas al ampleksa partopreno. *La estraro.*

## *Subtenantoj 1958 de CDEL*

| | |
|---|---|
| Stato la 25-an de marto 1958 .. kr. | 695,00 |
| S-ro Holger Hansen, Holbæk .... | 15,00 |
| S-ino Meta Knudsen, Holbæk .... | 15,00 |
| S-ro E. Skjerninge, Hvalsø ....... | 20,00 |
| S-ro Benny Nielsen, Kopenhago .. | 15,00 |
| S-ino Ellen Møller, Fåborg ....... | 15,00 |
| „1/3 Subtenanto“ — EJF ........ | 5,00 |
| S-ino Martha Vasiljef, Kopenhago . | 15,00 |
| F-ino Jenny Nielsen, Fredericia ... | 15,00 |
| Stato, la 25-an de aprilo 1958 .. kr. | 810,00 |

Koran dankon al ĉiu Subtenanto. — Poŝtkonto 573.70, CDEL, Algade 11, Nykøbing Sjælland, kun dankemo ricevas la kotizojn.

*L. E. Kromann Jensen*
(afergvidanto de CDEL)



## D. E. F. meddeler:

at vi arrangerer en tur til *Salzkammergut* i Østrig, 6.—17. juli; 12 dage; toget. Vi skal bo i Schwarzindien ved Mondsee og direkte ved søen med den dejligste badestrand. Herfra foretager vi udflugter med skib, tog og bus til de skønneste steder i de storslåede alpeegne, bl. a. til Wolfgang med den romantiske kro „Hvide Hest“, kendt fra operetten „Sommer i Tyrol“. Hr. Fötinger, som nylig har talt i 22 danske Esp.-foreninger, vil være vor fører under hele opholdet. Prisen for denne tur, alt iberegnet, er kun 527 kr. Skriv efter program. Sidste indmeldelsesfrist 1. *juni*.

at ovennævnte tur træder i stedet for den til Jugoslavien og Italien, som måtte aflyses på grund af utilstrækkelig tilslutning. Ovennævnte til Salzkammergut er allerede *sikret*. Det samme gælder vore andre ture.

at vi endnu kan tage *nogle enkelte* deltagere til vor Werfen-tur 29/6—8/7 (toget, 475 kr.) og til vor Harz-tur 27.—31. 7. (bus, 179 kr.). Er De interesseret, bedes De tilmelde Dem inden 1/6.

at der er blevet 2 pladser ledige på vor kongres-tur til *Mainz* 1.—10. 8. (bus, 465 kr.). Den, der kommer først til mølle, får først malet!

at vi venter Dem til *Helsingør* 19.—26. juli til feriekursus, hvor De vil få en glimrende talefærdighed i Esperanto. Sidste indmeldelsesfrist 15/6.

*L. Friis,*
*Ingemannsvej 9,*
*Aabyhøj*

# La jarkunveno de CDEL 1958

*Loko: Selskabslokalerne, Jernbane Allé 41, Vanløse.*

(Alveninte al la S-stacio kaj trapasinte la biletkontrolon oni uzu la *maldekstran* elirejon. La kunvenejo situas oblikve kontraŭ la stacio.)

## PROGRAMO:

*Sabaton la 24-an de majo.*

15,00-a horo: La kongreskontoro malfermiĝas.

20,00-a horo: Interkona vespero.

*

*Dimanĉon la 25-an de majo.*

8,00-a horo: La kongreskontoro malfermiĝas.

9,30-a horo: La solena malfermo de la Jarkongreso de C. D. E. L.

11,00-a horo: La ĝeneralkunveno de C. D. E. L. komenciĝas.

11,45-a horo: Komuna fotografado.

12,00-a horo: Lunĉo (Sildemad og forloren skildpadde).

13,00-a horo: La ĝeneralkunveno daŭriĝas.

18,00-a horo: Festmanĝo (Tartaletter med fisk. Svinekam. Is).

20,00-a horo: Festvespero.

? Balo.

*

*Lundon la 26-an de majo.*

8,00-a horo: La kongreskontoro malfermiĝas.

9,00-a horo: Fakkunvenoj. E. A. D. I. kaj K. E. L. D.

10,00-a horo: Laborkunveno.

Ĉa. 12,00-a horo: Oficiala fermo de la Esperanto-Jarkongreso 1958.

### PROGRAMO DE LA VESPERFESTO

*dimanĉon la 25-an de majo je la 20,00 h.*

1. Muziko.
2. Konferencio.
3. „La cigaro". Personoj: Li, ŝi, la edzo.
4. Kantoj de Laurids Lauridsen.
   Willy Petersen.
   Akomp.: Einar Trærup.
5. „La duelo". Personoj: Li, ŝi, la edzo.
6. Muziko.
7. Kantoj de Kai Rosenberg.
   Birthe Trærup.
   Akomp.: Kai Rosenberg.
8. „Matena atmosfero". Personoj: Li, ŝi, la edzo.
9. Spritaj kapoj. Kai Gabriel-Hansen.
10. Muziko.
1.1 „Ulriko kaj Luiso."
   Esperanto-opero de Kai Rosenberg.
   La plej unua prezentato de opero en Esperanto.
12. Granda balo.

Evt. ŝanĝoj en la programo rezervataj.

*La komitato.*

# Raporto

*1-a de marto 1957 ĝis 31-a de marto 1958*

*Membronombro.* La evoluo de la membronombro estis:

| | 1/1 1955 | 1/4 1955 | 1/1 1956 | 1/4 1956 | 1/1 1957 | 1/4 1957 | 1/1 1958 | 1/4 1958 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Aliĝintaj kluboj ............ | 32 | 32 | 35 | 35 | 37 | 37 | 36 | 36 |
| Klubmembroj .............. | 812 | 821 | 925 | 923 | 969 | 992 | 956 | 979 |
| Izoluloj .................... | 97 | 88 | 97 | 89 | 95 | 79 | 91 | 94 |
| Membroj, kune ............ | 909 | 909 | 1022 | 1012 | 1064 | 1071 | 1047 | 1073 |
| El ili „duobloj" ............ | — | — | 33 | 33 | 39 | 40 | 34 | 34 |
| Membroj entute ............ | 909 | 909 | 989 | 979 | 1025 | 1031 | 1013 | 1039 |
| Krome: Subtenantoj ........ | 0 | 0 | 23 | 32 | 41 | 24 | 57 | 46 |

*Novaj kluboj.* Du novaj kluboj aliĝis al CDEL en la periodo, nome Viborg kaj Nyborg. Bedaŭrinde la kluboj en Slagelse, Store Hedinge kaj Oksbøl devis ĉesi.

*Ekonomio.* La ekonomia situacio je la 1957-a jarfino montras malpli bonan staton ol je la lasta jarfino. La kaŭzo estas, ke la ligaj elspezoj kreskis de 8043 kr. en 1956 al 9427 kr. en 1957, dum la ligaj enspezoj en la sama periodo kreskis per nur 485 kr. El la sumo 1384 kr. Dansk Esperanto-Blad ricevis 836 kr. pli ol en 1956, krome estis necese pruntedoni al Libro-Servo grandan sumon. Tiuj ĉefaj faktoj kaŭzas, ke la likvidaj valoroj malkreskis per ĉ. 700 kr. La perspektivoj por 1958 ne estas bonaj el ekonomia vidpunkto, ĉar la elspezoj verŝajne konstante kreskos, ĉar estas ankoraŭ multaj farindaj taskoj antaŭ ni. Do la stato daŭre estas, ke CDEL nenion efektivan povas fari sen la aparta helpo flanke de la membraro pro tio, ke la ordinaraj kotizoj kovras nur la plej necesajn elspezojn. Ni tial esperas, ke ĉiu membro de CDEL propravole plialtigu sian kotizon al CDEL per la *Subtenanto-kotizo.* En la jaroj 1955, 1956 kaj 1957 anoncis sin kiel Subtenantoj resp. 23, 41 kaj 57 membroj, kiuj enpagis resp. 360, 615 kaj 855 kr. En 1958 ĝis 1/4: 46 Subtenantoj kaj 710 kr. La sumon, kiun Subtenantoj enpagas, ni uzos precipe por nia propaganda laboro, konsiderante nian bazan ekonomian planon, t. e. plibonigi la likvidecon kaj uzi monon nur por la plej necesaj kaj farendaj taskoj.

*Libro-Servo.* Oni vendis varojn por 10.900 kronoj, i. a. por 5.400 kronoj per la librovendantoj en 19 kluboj. Oni investis monon en novaj leterblokoj kaj kristnaskaj poŝtkartoj, kaj nova eldono de la Ŝlosilo aperos en 1958. Ni sukcesis pagi al granda parto de niaj kreditoroj.

*Dansk Esperanto-Blad* aperis dum 1957 kun 124 paĝoj; en 1956 la paĝnombro estis

## *Lange 60-jara*



La 27-an de majo s-ro O. C. *Lange* fariĝos 60-jara.

Lange naskiĝis en Fredericia, sed siajn plej multajn jarojn li pasigis en Odense.

120. La preskostoj kreskas rapide, kaj la ekonomio de la gazeto estas grava problemo por ni. Ni plialtigis la anoncprezon.

*Propagando.* La *Gazetara Servo* elsendis nur 4-foje informojn, ĉar mankis laborforto por plia laboro sur tiu kampo. La kluboj kaj unuopaj esperantistoj plurfoje iniciatis bonegajn artikolojn, precipe en siaj lokaj gazetoj. En la jaro 1957 aperis laŭ la eltondaĵoj en nia posedo 602 artikoloj aŭ informoj pri Esperanto en la taĝurnaloj krom kelkaj en periodaĵoj, do preskaŭ 2 ĉiutage meze. Kompare oni povas mencii, ke dum la periodo de Gazetara Servo de 41-a UK, 9 monatoj, aperis 1144 artikoloj, do proksimume 4 potage. Oni vendis 2315 ekzemplerojn de „*Verden bliver mindre og mindre*", kaj la stoko elĉerpiĝis dum 1957. Sed dank' al la Subtenanto-kotizoj estis eble noveldoni la broŝuron komence de 1958. Ĝi nun aperis en formo de kajereto, presita en du koloroj sur pli bona papero. La vendprezo estas 1 kr. pro 10 ekzempleroj + afranko. Ni sendis ekzempleron de „Verden bliver mindre og mindre" al la privataj adresoj de *ĉiuj parlamentanoj*. La nova *reklam-afiŝo* aperis ĉe la lasta jarkunveno, kaj oni jam vendis 286 ekzemplerojn de ĝi. Krome oni vendis 16 ekzemplerojn de la ekspozici-afiŝo. Novaj *reklam-glumarkoj* estas en preparo kaj baldaŭ aperos. Ni ekonomie subtenis la propagand-glumarkojn de EADI. La *Migrantan* Ekspocicion oni montris en du lokoj. Per cirkulero ni admonis niajn klubojn fari danlingvajn *prelegojn pri Esperanto* en neesperantistaj societoj. Kune kun la aliaj skandinavaj landaj asocioj ni proponis al *Skandinava* Konsilantaro eldoni elektitan skandinavan literaturon en Esperanto; la konsilantaro nun pritraktas la aferon. Ni ekonomie subtenis la kurs-propagandon diversloke sur Selando. Ni ankaŭ subtenis propagandon por Esperanto inter la kvakeroj en la tuta mondo.

*Kursoj.* Dum 1957—58 ni havis du eksterlandajn *Ĉe-instruistojn*, s-ino Haudebine instruis en Næstved, Haslev, Køge kaj Korsør, kaj s-ro Mildwurf instruis en Silkeborg, Herning kaj Vejle. Venontsezone ni ankaŭ provos starigi Ĉe-kursojn en aliaj regionoj de la lando, ekz. en Fueno, en plej norda Jutlando, en plej suda Jutlando, en Bornholm kaj en okcidenta Selando. Nia celo estas laborigi multajn eksterlandajn Ĉe-instruistojn dise en la lando. La *koresponda kurso* de CDEL, havis dum 1957 15 lernantojn; 53 personoj petis provlecionon; oni reklamis en DEB, Folkeskolen kaj Lollands Tidende; daŭriga kurso estas en preparo. Kiel kutime ni daŭrigas nian *kursstatistikon.*

*Prelegvojaĝoj.* Nin vizitis Joŝiko Kaĵino el Yokohama, kaj en majo venos Renée Christiansen el Argentino. Ni devis nuligi prelegvojaĝon de Elisa Jacobs. Ni planas prelegvojaĝojn de diversaj eksterlandanoj en la venonta tempo, ekz. la budhisto Margaret E. Bowden, s-ro Alexander Starke de Erlangen, la polo Romuald Skalinski, s-ro Moravec el Flensborg kaj multaj aliaj.

*Radio, televido, filmo.* La prezidanto de CDEL proponis sin mem kiel partoprenanton en la radio- kaj televido-elsendo „Kvit eller Dobbelt". Ni proponis, ke oni en la televida elsendo Eurovision prezentu la Universalan Kongreson en Mainz; oni respondis ne negative. Ni proponis, ke la ministerio pri eksterlandaj aferoj eldonu novan filmon kun Esperanto-tekstoj; la ŝancoj por pozitiva rezulto estas grandaj, kaj la ministerio estas tre interesita. Ni proponis, ke la dana, sveda kaj norvega landaj

---

Tie li lernis Esperanton en 1924 ĉe *Axel Andersen.* Dum multaj jaroj li estis prezidanto de la tiea Esperanto-klubo, sed li laboris plej multe por CDEL, nia landa organizaĵo. Dum 17 jaroj li estas membro de la ĉefestraro, dum 8 jaroj prezidanto, dum 4 jaroj redaktoro de Dansk Esperanto-Blad, kaj krome li estas UEA-komitatano depost 1947.

Lange estas homo, kiu estas eksterordinare laborema kaj entuziasma pri Esperanto. Lia laboro havis grandan signifon por nia movado, kaj oni ne povas imagi al si, kiel status Esperanto hodiaŭ en nia lando sen li.

Ni bondeziras al Lange okaze de la naskiĝtago, kaj ni esperas, ke ni daŭre povos vidi lin en nia movado same juneca kaj energia kiel ĝis nun.

*Svend Dragsted.*

asocioj kune aĉetu koloran sonfilmon kun Esperanto-parolo „Tamen estas bone vivi“ pri la efikoj de la atombombo, sed la norvegoj malakceptis la planon.

*Landa Komunkomitato.* Inter la prezidantoj de CDEL kaj DLEA okazis ampleksa letera diskuto pri la eblecoj starigi novan komunkomitaton, sed sen rezultoj. Ĉe posta kunveno en Aabyhøj ankaŭ ne estis eble trovi akcepteblan solvon. En la nuna momento ne estas eble diri ion certan pri la rezulto, ĉar ni atendas la decidon de la ĝeneralkunveno de DLEA, sed ne ekzistas kaŭzo por optimismo. Ni diskutos la aferon ĉe nia jarkunveno en Kopenhago. Ni jam sendis ampleksan materialon pri la afero al niaj kluboj, kaj la saman materialon ricevos ĉiuj partoprenantoj de la jarkunveno.

*Kongresvojaĝoj.* Ni devis nuligi nian kongresvojaĝon al Marseille pro tro malmulta partopreno. Ni aranĝos vojaĝon al la Universala Kongreso en Mainz; programo pri tiu interesa kaj malmultekosta vojaĝo estas senpage havebla ĉe Kühlmann, Prins Jørgensgade 4 A, København N.

*Hungarhelpo.* Ni finis nian hungarhelpon. Vidu la raporton en DEB, paĝo 120, 1957, kaj paĝoj 7—8, 1958.

*Diversaj Servoj.* Nia *Filmstria Servo* disponas pri 8 filmstrioj, kaj nia *Teatraĵa Servo* pri 5 teatraĵoj. En nia *kliŝarkivo* nun troviĝas 194 kliŝoj. Al niaj kluboj ni disponigis la sonbendon „la urbestro de Mainz invitas la esperantistojn“„ Ni nun provos ricevi pli bonan ordon en nia tre ampleksa kolektaĵo de malnovaj *gazeteltranĉaĵoj;* niaj kolektaĵoj post 1948 estas en ordo. Ni daŭrigas nian kolektadon de *uzitaj poŝtmarkoj.* Laŭbezone ni sendas *cirkulerojn* al niaj kluboj kaj izoluloj.

*Arkivo.* La arkivo de CDEL provizore troviĝas en Holte en relative bona ordo; konstanta gvidanto estas serĉata.

*Diversaĵoj.* Por specialaj aranĝoj okaze de la 100-jara datreveno de la *naskiĝo de Zamenhof* UEA petis nin elekti unu membron de speciala komitato; ni elektis d-ron Paul Neergaard, Kopenhago. La dana registaro havis laŭ nia peto *oficialan reprezentanton* ĉe la Universala Kongreso en Marseille. Rilate al *Unesko* kaj la *Eŭropo-Konsilantaro* ni laboras laŭ la direktivoj de UEA, kiu ne dum la pasinta jaro petis nin pri iu agado. En 1957 la ĉefestraro verkis novan *„Vejledning for klubber under CDEL“* kun informoj utilaj por la kluboj en iliaj rilatoj al CDEL kaj ĝia ĉefestraro. *Danaj Ŝtatfervojoj* eldonis tri broŝuretojn kun Esperanto-teksto. Ni provis presigi artikolon pri la *70-jara ekzistado de Esperanto* en diversaj tagĵurnaloj, sed sen rezulto. CDEL malmultekoste aĉetis *duplikatoron.*

*La ĉefestraro de CDEL.*

---

## Grave

Por eviti ĉiujn miskomprenojn ĉe la jarkunveno en Kopenhago ni deziras substreki jenajn aferojn:

1) Esperanto estas la oficiala lingvo de la jarkunveno. Nur la inaŭguro okazos danlingve.

2) Oni rajtas ĉeesti la ĝeneralkunvenojn de CDEL sen pagi jarkunven-kotizon (sed nur la ĝeneralkunvenojn).

3) Por povi partopreni la ĝeneralkunvenojn de CDEL oni ĉe la enirejo devas pruvi sian membrecon de CDEL per montro de valida membrokarto.

4) Laŭ la leĝoj de CDEL, §§ 11 kaj 15, ĉiu klubo de CDEL enpagu sian kotizon al CDEL antaŭ la ĝeneralkunveno por partopreni en la ĝeneralkunveno kaj por ricevi la voĉdonilojn.

---

## Prelegvojago

*kun s-ino Margaret E. Bowden*

La ĉefestraro de CDEL petas min substreki, ke la aranĝo venontan aŭguston kun la angla s-ino Margaret E. Bowden estos oficiala aranĝo de CDEL. Tion mi bedaŭrinde ne menciis en la cirkulero al la kluboj.

*Erling Knudsen*

---

## Libro-servo

Hviddingvej 52, postkonto 13652, beder høfligst alle sine klubsælgere indsende afregning over vinterens salg inden 30. maj.

# CENTRA DANA ESPERANTISTA LIGO

## Spezoj 1957

| *Elspezoj:* | | | *Enspezoj:* | |
|---|---|---|---|---|
| Dansk Esperanto Blad | | 6 136,00 | Membro-kotizoj | 8 524,32 |
| Gazetara Servo | | 383,96 | Subtenanto-kotizoj 1957 | 855,00 |
| Propagando | | 136,81 | Donacoj | 74,65 |
| Oficejaj elspezoj | | 1 958,21 | Vendo de uzitaj poŝtmarkoj | 128,00 |
| Kotizo al U. E. A. | | 416,50 | Afiŝoj kaj broŝuroj | 50,80 |
| Donaco al C. E. D. | | 80,00 | Rentumo | 57,93 |
| Ĉe-instruisto | | 55,33 | Aliaj enspezoj | 22,60 |
| Prelegvojaĝoj | | 171,89 | Enspezoj de koresponda kurso | 241,78 |
| Aliaj elspezoj | | 88,35 | | |
| Elspezoj de koresponda kurso | | 171,10 | | |
| Elspezoj de kongresvojaĝsekcio | | 82,09 | | |
| *Neta profito:* | | | | |
| La Ligo | 286,25 | | | |
| Koresponda kurso | 70,68 | | | |
| Kongresvojaĝsekcio | ÷ 82,09 | 274,84 | | |
| | | 9 955,08 | | 9 955,08 |

## Bilanco 31/12 1957

| *Aktivoj:* | | | | *Pasivoj:* | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| *La Ligo:* | | | | *La Ligo:* | | | |
| En kaso | 535,87 | | | Kreditoroj | | 293,72 | |
| En banko | 716,18 | | | Antaŭpag. membro-kotizoj | | 1 960,12 | |
| En poŝtkonto | 501,61 | 1 753,66 | | Subtenanto-kot. 1958 | | 60,00 | 2 313,84 |
| Debitoroj: | | | | *Kapitalkonto:* | | | |
| Libro-Servo | 1 352,92 | | | *Libro-Servo de CDEL* | | 6 944,33 | |
| Aliaj | 69,90 | 1 422,82 | | *La kongresvojaĝsekcio:* | | | |
| Kotizo-ŝuldoj | | 581,60 | | 1/1 1957 | 241,70 | | |
| Afiŝoj | | 217,00 | | ÷ deficito | 82,09 | 159,61 | |
| Aliaj valoroj | | 829,50 | 4 804,58 | *La koresponda kurso:* | | | |
| *La kongresvojaĝsekcio* | | | 159,61 | 1/1 1957 | 603,67 | | |
| *La koresponda kurso* | | | 674,35 | + profito | 70,68 | 674,35 | |
| *Libro-Servo de C. D. E. L.* | | | 6 944,33 | *La Ligo:* | | | |
| | | | | 1/1 1957 | 2 204,49 | | |
| | | | | + profito | 286,25 | 2 490,74 | 10 269,03 |
| | | | 12 582,87 | | | | 12 582,87 |

Nykøbing Sjælland, 27-an de januaro 1958.

*L. E. Kromann Jensen.*

Aprobita la 2-an de febr. 1958 de la ĉefestraro.

Ni subskribintaj revizoroj kontrolis la kontlibrojn kaj dokumentojn kaj trovis ĉion en bona ordo.

Kopenhago, la 16-an de aprilo 1958. *C. R. Ege.* *Arnold Jensen.*

# DANSK ESPERANTO-BLAD

## Spezoj 1957

| *Elspezoj:* | | *Enspezoj:* | |
|---|---|---|---|
| Preso de DEB + kliŝoj | 6 317,55 | Abono, Centra | 6 136,00 |
| Distribuafranko | 1 220,00 | Aliaj abonoj | 190,15 |
| Alia afranko | 86,44 | Kromvendo de DEB | 25,50 |
| Kontormaterialo | 24,55 | Anoncoj + reklamfolioj | 1 300,70 |
| Neta enspezo | 90,89 | Donacoj | 60,00 |
| | | Diversaĵoj | 27,08 |
| | 7 739,43 | | 7 739,43 |

## Bilanco je 31/12 1957

| *Aktivoj:* | | | *Pasivoj:* | |
|---|---|---|---|---|
| En poŝtokonto | | 989,44 | Ŝuldo al la presejo | 1 476,50 |
| Provizo de respondkuponoj | | 16,20 | Ŝuldo al la poŝto, Aarhus | 130,62 |
| Provizo de U-L-steloj | | 11,00 | Antaŭpagita abono | 68,00 |
| Provizo de L-S-pruntokvitancoj | | 120,00 | Ceteraj kreditoroj | 129,50 |
| Valoro de kontorobjektoj | | 92,00 | Delkrederekonto | 50,00 |
| Debitoroj | | 601,22 | | |
| *Kapitalo:* | | | | |
| 1/1 1957 | 115,65 | | | |
| ÷ neta enspezo | 90,89 | 24,76 | | |
| | | 1 854,62 | | 1 854,62 |

Esbjerg, la 25-an de januaro 1958.

*C. Graversen.*

Aprobita la 2-an de febr. 1958 de la ĉefestraro.

Ni subskribintaj revizoroj kontrolis la ĉi suprajn kontojn pri la jaro 1957 kaj trovis ĉion en bona ordo.

Kopenhago, la 16-an de aprilo 1958.

*C. R. Ege.* *Arnold Jensen.*

---

# LIBRO-SERVO

## Spezoj 1957

| | | |
|---|---|---|
| Varvendo | | 10 884,06 |
| Varstoko 31/12 1957 | | 14 086,17 |
| | | 24 970,23 |
| Varstoko 1/1 1957 | 11 823,80 | |
| Varaĉeto | 11 801,24 | 23 625,04 |
| Gajno | | 1 345,19 |

| | | |
|---|---|---|
| Kuntara enspezo | | 1 345,19 |
| Afranko | 503,73 | |
| Anoncoj | 62,50 | |
| Kostoj | 39,35 | |
| Oficejaĵoj | 138,41 | |
| Loĝejpago | 360,00 | |
| Amortizo 10 % | 52,74 | |
| Malprofito | 0,75 | |
| Profito | | 106,66 |
| Rentumoj | | 27,07 |
| Neta enspezo | 321,44 | |
| | 1 478,92 | 1 478,92 |

## Bilanco je 31/12 1957

| | *Aktivoj* | *Pasivoj* |
|---|---|---|
| En kaso | 179,30 | |
| En poŝto | 275,95 | |
| En banko | 194,14 | |
| Oficejiloj | 474,65 | |
| Varstoko | 14 086,17 | |
| Varstoko ĉe klubvendistoj | 8 203,94 | |
| Debitoroj | 1 122,60 | |
| Kreditoroj | | 6 471,77 |
| 41-a U. K. | | 2 563,55 |
| C. D. E. L. | | 8 297,25 |
| Prunto-kvitancoj | | 3 209,00 |
| Redukto de stoko de klubvend. | | 2 374,03 |
| Kapital-konto | | 1 621,15 |
| | 24 536,75 | 24 536,75 |

Rødovre, la 15-an de aprilo 1958.

*A. Wendel.*

Aprobita. 21/4 1958. *Sv. Dragsted.* — 22/4 1958. *L. E. Kromann Jensen.*

Ni subskribintaj revizoroj kontrolis la dokumentojn de la librotenado kaj komparis ilin kun la enskriboj en la kontlibro kaj trovis ĉion en bona ordo.

Kopenhago, la 24-an de aprilo 1958.

*C. R. Ege.* *Arnold Jensen.*

## La dana radio sendis prelegon en Esperanto

Dimanĉe la 4/5 je la 10,35-a h. la dana radio elsendis 20 minutan prelegon pri *Knud Rasmussen kaj la eskima poezio* de instruisto *Poul Thorsen.*

*Knud Rasmussen* (1879—1933) estis granda esplorvojaĝanto en polusaj regionoj. Li ankaŭ estis folkloristo kaj kolektis multe da eskimaj fabloj kaj kantoj en pluraj kontinentoj. Ĉion li reverkis en la danan tiel manifestante grandan poezian talenton.

En la prelego oni aŭdis specimenon, voĉon de kantantaj eskimoj, kaj ankaŭ la prele-

ganto deklamis kelkajn el siaj Esp.-tradukoj.

Aŭskultinte — *kaj ankaŭ neaŭskultinte* danku al Statsradiofonien, Radiohuset, København V., petante pli da prelegoj en Esperanto, kaj eventuale proponu temojn, kiuj havas vian intereson.

## Oficiala permeso pri eksperimenta instruo de Esperanto

Lerneja Direkcio por la komunumaj lernejoj en Kopenhago donis permeson pri eksperimenta instruo en Esperanto en Vibenshus lernejo ekde venonta lerneja jaro en la deviga lecionaro.

4-a unuagrada klaso daŭrigos la instruadon dum 2 jaroj, tiamaniere ke la studado de Esperanto fariĝos preparo por la instruado de aliaj fremdaj lingvoj, simile al eksperimentoj en Skotlando kaj Jugoslavio.

La instruistino, *Roma Thorsen,* jam dum jaroj uzas Esperanton por praktikaj celoj en sia ordinara instruado, speciale en la geografiinstruado per interŝanĝo de diversa materialo por vigligi la instruadon. Ankaŭ nun la Esperantoinstruado estos kombinita kun praktika instruo de geografio, ĉar ĉiusemajne oni disponigis geografilecionon por Esperantoinstruo kaj -praktikado. Krome oni permesis aldoni kromhoron al la deviga lecionplano por rekta esperantoinstruado. Dum 3 jaroj Roma Thorsen jam instruas Esperanto en tiel nomata hobiklubo ekster la ordinaraj lecionoj.

Eble la partopreno en la internaciaj rondoj de lernejaj gazetoj, *Grajnoj en Vento,* preparis la grundon por la akcepto de tiu ĉi eksperimento, ĉar tiu laboro multe imponis al lernejaj instancoj kaj la gepatroj, kiuj en informa kunsido unuvoĉe aprobis la eksperimenton.

# LA KLUBA VIVO

Redaktas: S-ino *I. Iburg,* Sct. Clemens, Fyn.

*Spjellerup*

Sep membroj el la klubo faris dum la vintro studrondon en la hejmoj. Dum la vintro tri geeksterlandanoj vizitis nian klubon. Unue s-ino *Pozenel* el Jugoslavio, kiu en Karise Højskole paroladis pri sia hejmlando kaj montris lumbildojn. La Haslevanoj ankaŭ ĉeestis. Due s-ro *Fötinger* el Aŭstrujo paroladis pri Salzburgo kaj ĝia regiono kaj montris lumbildojn. Fine la 31/3 *Joŝiko Kaĵino* el Japanujo vizitis nian etan klubon. E-istoj el Køge, Haslev kaj St. Heddinge ĉeestis. La ĉarmegan prezentadon de Joŝiko Kaĵino tradukis s-ro O. *Christensen.* Tio estis bonega propagando.

*K. O.*

*Aarhus*

Den 24/3 sluttede vort kursus for denne sæson med et kaffebord på hotel Ansgar, hvor foruden eleverne også en del af medlemmerne var til stede. Læreren fik overrakt en smuk erindringsgave ledsaget af en tale på nydeligt Esperanto af fru *Gerda Frandsen.* Hr. C. A. *Hvorslev* læste et lille stykke op af Fundamenta Krestomatio, og der blev givet forskellige praktiske oplysninger om bl. a. U. E. A.s Delegito-system. Den hyggelige sammenkomst sluttede med flere sange.

(El „*Informilo*“)

*Silkeborg*

La 23/3 nia klubo kune kun A. O. F. aranĝis publikan kunvenon. D-ro *Mildwurf* prelegis pri la sekvoj de la atombombo en Hiroŝimo kaj poste montris al ni filmon, per kiu ni havis la okazon vidi, kiel la homoj suferas dek du jarojn post la

milito pro ĉi tiu terura bombo. La filmo estis tre reala kaj kortuŝa.

Post ĉi tiu iom malgaja distro la japana ĵurnalistino *Joŝiko Kaĵino* faris prezentadon.

La kunveno estis bone vizitata, kaj la klubanoj trovis okazon poste ĝui la kuneston ĉe la kaftablo kun la ĉarma japanino.

La 27/3 oni instruis la komencantojn pri la Esp. gramatiko danlingve. Poste s-ino *Kolle* rakontis pri sia restado en Neydharting, Aŭstrujo.

Per magnetofono ni aŭdis la urbestron de Mainz, kiu invitis al la mondkongreso kaj krome la rondtablan interparoladon inter *Lapenna, Dragsted, Stig Hansen* kaj *Paul Neergård,* kiu estis elsendita en radio okaze de la kongreso en Kopenhago. — Post kaftrinkado *Willy Nielsen,* Kompedallejren, rakontis al ni pri „Mondpaca Esperantista Movado".

La 10/4 ni havis okazon auskulti la voĉon de *Joh. H. Rosbach* el Sarpsborg en Norvegujo pere de la sonbendo. Unue s-ro Rosbach salutis nian klubon kaj urbon. Poste li rakontis ion pri la klubo en Sarpsborg. Tre amuze estis ankaŭ aŭdi la novelon „Ofendita". Je la fino de la bendo s-ro Rosbach voĉlegis malgrandan meditadon pri la vivo. La vespero finiĝis per ludo por ekzerci la lingvon.

*Sigrid Kolle.*

*Fåborg*

La 25/1 okazis kunveno kun 50 ĉeestantoj. S-ro *L. Friis* montris tri belajn, kolorajn filmojn, kiujn li mem fotografis dum rondvojaĝoj kune kun aliaj danaj E-istoj. S-ro Friis vigle komentis la bildojn kaj fine admonis ĉiujn partopreni en Esp.-vojaĝoj al fremdaj landoj kaj en la Esp.-kursoj en Helsingør kaj Vejle.

La 23/2 40 personoj partoprenis kunvenon kun s-ro *Fötinger.* Post la kaftrinkado 4 membroj prezentis malgrandan skeĉon, kaj poste la anoj ekzercis du novajn kantojn.

110 ĝojaj homoj kolektiĝis la 13/4 en „Risten" por festi la duan naskiĝtagon de nia klubo. Post bonvenaj vortoj de la prezidantino, s-ro Søren Olesen, ministro por enlandaj aferoj, faris la festparoladon pri la temo: naturaj lingvoj kaj artefaritaj. — La urbestro de Fåborg, s-ro Toftager, kiel estro de la vesperlernejo dankis pro diligenta laboro de kaj la lernantoj kaj la instruistoj. Li gratulis ĉar la kluba vivo montras eksteren, ke Fåborg vere estas „la vivanta urbo kun la malnovaj memoraĵoj". — La eksurbestro, s-ro Engelund, esprimis sian plezuron pro la bona kontakto dum sia funkciperiodo. — Ampleksa muzika, kanta kaj literatura programo kolorigis la festvesperon, kiu finiĝis per vigla dancado.

*Svend Dragsted:* **ESPERANTO GRAMMATIK**

Heftet: Kr. 4,50
Indbundet: Kr. 6,50
Uundværlig for danske esperantister

*Fås hos klubbernes bogsælgere eller hos CDEL's Libro-servo*

### *Kie mi trovos la klubon?*

*Silkeborg*

30/5 je la 20-a h. ĉe Nørgaard Jepsen, Skovvangen 17: Klubkunveno. Poste ni iros en la arbaron por aŭskulti la birdkantadon.

---

EN LA PROVIZORA TAGORDO de la ĝeneralkunveno en Kopenhago lastnumere mankas en punkto 5 la vortoj „Aprobo de la raporto".

LA KRUCVORTENIGMON en n-ro 4 solvis dek. La libropremion gajnis s-ro *Herluf Westergård*, Børkop.

LA NIGRA PIRATO skribis jene en sia dokumento:

Mi estas malsana, kaj baldaŭ mi mortos. Sur ĉi tiu dokumento mi volas informi pri la trezoro, kiun mi kaŝis antaŭ 16 jaroj sur malgranda insulo en la Pacifika Oceano. La insulo estas la plej malgranda de la Tongainsuloj. Sub monteto ĉe la norda marbordo mi kaŝis mian trezoron. La Nigra Pirato.

---

### *Deziras korespondi*

15- kaj 16-jaraj hungarinoj, 15- kaj 22-jaraj vietnamanoj kaj 18-jara japano. Petintoj povas ricevi iliajn leterojn por elekto. Adreso: D.E.B., Primulavej 61 III, Odense.

---


# FOTO
## *Aftryk*

til meget fordelagtige priser. Således kun 26 øre for et 6 × 9. Ved 8 stk. og derover af samme negativ kun 22 øre pr. stk.

**Forlang prisliste!**

Mange års erfaring med forsendelsesforretning. Garanti for omhyggelig udført arbejde.

**Nia Foto,**
*Bjerringbro st.*
v/Henning Nielsen,

Telf. 357.
Giro 66122.

---

# DANSK VEGETARISK FORENING

**varetager vegetarernes fællesinteresser. Der kræves intet løfte af medlemmerne. Kontingent 7 kr. årligt. Ægtepar 8 kr., *inkl.* abonnement på VEGETARISK TIDSSKRIFT. Forlang gratis prøvenummer. Adresse: Ågade 114, II, København N. Telefon: Gothåb 1163 u.**

---

**Ni rekomendas al Esperantistoj**

restadon en nia unuaklasa hotelo. — Esperanto parolata.

*HOTEL DANIA*, Silkeborg. Tlf. 6 - 7 - 686.

---

☆ *Esperanto*-BOGTRYK

**Indhent tilbud gratis og uden forbindende hos Sønderjyllands ældste og største bogtrykkeri —**

MODERSMAALETS *Trykkeri*

**Haderslev — Telefon 22031**



A-S Modersmaalets Trykkeri - Haderslev